


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Graafthijk (N.H.)  
Nederlando.  
Gironumero 209354 Nederlando.  
Tel. 10

Jarabono:  
Nederlando: 0.75 guldeno  
Aliaj landoj: 1 guldeno  
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

## KIEL LA KALIFO AKIRIS JUSTON.

Estis varmega, sufoka vetero. Ĉe la rando de la ŝtona vojo, ne ombrita de arbo, nek de arbusto, sidis almozulo, vestita en polvaj ĉifonoj. Paŝe alproksimiĝis rajdanto. Kiam li estis je 20 metroj de la almozulo, ĉi tiu petis lin pri almozo, dum li multajn benojn elverŝis sur lin.

La rajdanto rigardis explore la almozulon, palpis en la zono kaj ĵetis al li malgrandan arĝentmoneron.

„Alaho rekompencu vian bonfaron, ho nobla sinjoro!” kriis la almozulo, prenante la moneron. Li rampis ĝis apud la rajdanto kaj kisis la borderon de ties mantelo. „Se vi nun bonvolus plenigi la kalikon de via boneco ĝis la rando, vi metus min sur la ĉevalon kaj kunrajdigus min al la urbo, ĉar la vojo tien estas longa kaj malfacila por lamulo kia mi.”

La viro kun la inteligentaj, afablaj okuloj ree atente rigardis la lamulon, poste li deĉevaliĝis, helpis lin surgrimpi kaj donis al li la bridojn. Li mem sidiĝis malantaŭ li, apogis lin en la flankoj, por ke li sidu pli sendanĝera. Kaj la almozulo, ŝajne kortuŝita pro tiom da boneco, dankis sian bonfaranton per tro belaj vortoj.

Kiom malmulte li supozis, ke la helpema viro, kies manplatojn li sentas varme en la flankoj, estas neniu alia ol Harun al Raŝid, la timinda, bona kaj justa kalifo. Laŭkutime Harun ankaŭ ĉifoje forrajdis sen sekvantaro, en la simplaj vestoj de ordinara mezklasulo. Tiel li migris tra la lando, nerekonate, por tiel aŭdi de siaj regatoj la veran opinion pri ĉiaj aferoj kaj ekscii, kion ili opinias bona kaj kion malbona. Ne sur belega, araba ĉevalo el sia reĝa



stalo li rajdis; nur antaŭ unu monato li aĉetis de kampulo la bonan obeeman beston, sur kiu li sidis. Li mem prizorgis, karesis kaj nutris ĝin, kaj kvankam ĝi tute ne estis de nobla deveno, li tamen ekamis ĝin. Kaj kiam la viro en la simpla, bruna kaftano, sidanta sur forta ĉevalo, haltis antaŭ iu kabano por peti akvon por sia ĉevalo aŭ tranoktejon por si mem, neniu ekpensis, ke li povus esti iu alia ol komercisto, kiu por siaj aferoj vojaĝas al Bagdad.

Malrapide la du viroj plu-rajdis en sunardo kaj polvo, malmulte parolante, la almozulo antaŭe, la kalifo post li. Ili ĝojis, kiam pli kaj pli alproksimiĝis la kupoloj kaj minaretoj de l'oskeoj, kiuj kontraŭ la blua fono de la sennuba ĉielo brile blanke konturiĝis. Jam ili estis en la antaŭurbo kaj baldaŭ en longa strato en la interna urbo, kiu kondukis al la foirplaco.

Sur la granda placo la almozulo haltigis la ĉevalon kaj sin turnis al la viro malantaŭ li.

„Nun deĉevaliĝu! Ĉi tie estas la foirplaco. Vi trovos la vojon. Mi iras nun hejmen.”

Harun ne kredis al siaj oreloj. „Ĉu mi devas deĉevaliĝi? Mi, de mia propra ĉevalo? Nun mi plu rifuzas helpon al vi, sendanka fripono. Kaj se vi ne estus lama, mi metus vin malmilde sur la straton. Sed rapidu, ĉar mia pacienco elĉerpiĝas.”

„Aŭdu tiun trompiston!” kriis nun la almozulo per ĉiuj fortoj, tiel ke la preterirantoj haltis kaj baldaŭ amaso da homoj staris ĉirkaŭ la rajdantoj. „Homoj, helpu min, ke mi akiru juston! Mi estas maljuna, malforta viro, kaj per miaj malmultaj fortoj mi povas nenion fari kontraŭ tiun friponon. Ke Alaho lin punu en liaj havaĵoj kaj sango, infanoj kaj nepoj! Mi trovis lin ĉe la vojo, multajn horojn de la urbo, lacega kaj elĉerpita kaj duonmorta pro soifo kaj malsato. Kaj li petegis min kunpreni lin. Mi kompatis la malfeliĉulon, kaj permesis al li sidiĝi malantaŭ mi sur la ĉevalo. Kaj anstataŭ esti danko al mi, li volas min ĉi tie deĉevaligi, kaj forkuri kun mia ĉevalo, la sola, kion mi, malriĉa viro, ankoraŭ posedas. Mi petegas vin, bonaj homoj, helpu min!”

Vane Harun klopodis konvinki la ĉirkaŭstarantojn pri la vero. La almozulo impresis la amason per siaj kriaĉanta voĉo kaj hipokritaj larmoj. Malpli kredinda estis tio, kion la alia rakontis; ke li, la posedanto de la ĉevalo, deĉevaliĝis por helpi la lamulon sur la ĉevalon kaj donis al li la pli bonan antaŭan lokon. La maljunulo, kiu iris lame kaj krome estis malriĉe vestita, kaŭzis kompaton. Plie, la homoj kiuj alkuris pro la kriado, kaj kies helpon li nun petis, estis



plejparte viroj kaj virinoj el la popolo, vivantaj en mizeraj cirkonstancoj. Ili sentis sin kiel liaj egaluloj kaj do volonte prenis partion por li. Tamen al kelkaj la malbona eksteraĵo de la maljunulo kaj lia laŭta kriegado kaŭzis malfidon. Ili opiniis ne eble, ke tiu trankvila viro en la bruna kaftano, kun sia sincera kaj afabla vizaĝo povus agi tiom malnoble.

Tiel la opinioj estis diferencaj; kaj por fini la kvereladon, diris Harun: „Ni iru al la juĝisto. Ne ekzistas tria persono, kiu vidis la okazintaĵon, do neniu povas atesti, ĉu por, ĉu kontraŭ. La juĝisto scios, kies vortojn li kredu. Kion li decidus, tio okazu!”

La lamulo, kiu fidis je sia tromp- kaj hipokrit-kapablo, kaj je siaj facile fluantaj larmoj, konsentis pri ĉi tiu plano, kaj ankaŭ la ĉirkaŭstarantoj akklamis ĝin.

Per multaj vortoj kaj viglaj gestoj la almozulo rakontis plorante, kiom malbone la viro kun la bruna kaftano lin traktis kaj post tio Harun komunikis pri la veraj cirkonstancoj per simplaj vortoj.

La juĝisto silente aŭskultis ilin kun serioza atento; poste li staris longan tempon meditanta.

„Kie estas la ĉevalo?” li demandis finfine.

„Ĝi staras ekstere, ĉe la pordo ligita.”

„Bone! Oni konduku ĝin en mian stalon. Kaj morgaŭ vi ambaŭ revenu, kvin horojn antaŭ sunsubiro. Tiam vi aŭdos mian decidon!”

La almozulo lamis plorante eksteren. Kaj antaŭ la pordo li rakontis ankoraŭ foje al la homoj, ke la viro, kiu ĵus iras ĉe la strangulo, volas forrabi de li lian solan posedaĵon, lian ĉevalon.

La sekvintan tagon akurate je la fiksita horo venis la du malpacantoj.

„La ĉevalo estas via!” diris la juĝisto al Harun. „Kaj vi, lamulo, vi mensogis impertinente. Vi repagis al vi montritan bonfaron per la plej malnobla malvirto, per maldanko. Tial vi nun rajdos sur la ĉevalo tra la plej dense loĝataj stratoj, tra la foirejo, kaj tra la urboplaco. Kaj publikaj anoncistoj sciigos pri via hontinda konduto, por ke plu nenium vi povu trompi per viaj hipokritaj larmoj. La korpan punon vi evitas nur, ĉar vi estas lama. Jen mia verdikto. Alaho min helpu!”

Ekzekutistoj forkondukis la vekriantan maljunulon, sur-ĉevaligis lin, kaj okazis, kiel la juĝisto ordonis. Harun al Raŝid restis meditanta.

„Ĉu ankoraŭ vi ion deziras?” fine la juĝisto demandis.



„Jes, sinjoro!” respondis la kalifo. „Se vi opinias min ne malinda por tio „do diru al mi: el kiuj cirkonstancoj vi povis konkludi la ruzaĵon de la sendanka almozulo?”

„Volonte mi tion diros al vi. De post hieraŭ mi donis al via ĉevalo nenion por manĝi nek por trinki. Mi lokigis ĝin en la stalo apud la pordo; tiel ĝi povis vidi vin, kiam vi venis ĉi tien por aŭdi mian juĝon. Kiam la almozulo preterpasis, la ĉevalo restis trankvile staranta, indiferece kaj kun klinita kapo. Sed kiam vi venis, ĝi movis la orelojn, forte spiris tra la nazo kaj turnis la kapon. Kaj kiam vi preterpasis, ĝi fariĝis maltrankvila, piedgratis la teron kaj henis. Pro tio mi sciis, ke vi estas ĝia mastro, de kiu ĝi spertis kaj atendis bonon.”

La viro en la bruna kaftano, kiu ĝis nun staris humile antaŭ la juĝisto, levis fiere la kapon. Liaj bonaj okuloj brilis, kaj li etendis la manon al la juĝisto, kiu tre miris pri la subita ŝanĝiĝo en la simpla komercisto.

„Vi estas saĝa kaj sagaca homo, sinjoro! Alaho donis al vi akrajn okulojn kaj juston en la koro! Alaho vin rekomencu pro via fidela devoplenumo!” Kaj kun fiere levita kapo la nekonato forpaŝis.

La saĝa juĝisto estis vokata al la kortego de la kalifo kaj ĝis sia morto li restis la fidela konsilanto kaj amiko de la bona, potenca Harun al Raŝid.

TRAD. VANE.

---

### EKONOMIA FRENEZAJO.

La amerika komercoficejo en Washington publikigis ciferojn, kiuj estas ..... timigaj:

En Brazilio en unu monato 775 milionoj da sakoĵ da kafo estis detruataj (tio estas preskaŭ la duono de la tutjara eksporto). La unuigitaj ŝtatoj de Ameriko buĉis kaj enfosis 10 % de la porkoj (pli ol 6 milionoj). Pli ol 2.000.000 tunoj da maizo estas uzitaj por hejti lokomotivojn. Da bovinoj estas mortigitaj (por malpliigi la buterproduktadon) dum la unuaj tri monatoj 1935 pli ol 500.000! En Los Angelos oni verŝis kelktempe dum unu tago 200.000 litrojn da lakto en la maron. En Nederlando oni oferis 100.000 porkidojn al la eraro de la mond-mastrumado.

Kaŭzo de ĉio estis: nekontrolita bredado kaj troa kulturado — samtempe en aliaj landoj miloj malsatas.



## MAJA KANTETO.

*Dolĉe.*

Re - ve - nu, ĉar - ma Ma - jo, kaj i - gu pa - ra -



diz' La kam - pojn kaj ar - ba - rojn, Per vi - a dol - ĉa



kis' . Ki - se - to vi - a i - ĝas Su-



bi - te be - la flor'; Vi mon - tras la na-



tu - ron En ĝi - a tu - ta glor'.

La vintraj tagoj ankaŭ  
 Ne estas ja sen ĉarm';  
 Ĉe l'forno bone estas  
 Dum frosto kaj malvarm'.  
 Laŭ ĉia maniero  
 Agrable ludas ni;  
 En nia rond' ni dancas  
 Kaj glitas sur glaci'.

Sed kiam birdoj kantas,  
 Kaj ni en la printemp'  
 Laŭ kamp' kaj vojoj saltas  
 Pli bona estas temp'.  
 Revenu, ĉarma Majo,  
 Kun viaj ĝoj' kaj gaj',  
 Kun viaj buntaj floroj,  
 Revenu, ĉarma Maj'.

Antverpeno (Belg.)

trad. J. VAN SCHOOR.



## KARA PATRINETO.

(traduko dediĉita al mia maljuna patrino. — M. M. Stauer).

Tuttage saltinte kaj nun laciĝinta mi sidas vespere ĉe tablo en mia seĝeto..... Estas malfrue kaj jam delonge eltrinkita la taso da lakto; dormemo jam fermadas miajn okulojn, sed mi ne moviĝas de la loko, — mi sidas kaj aŭdas — kaj kial ne aŭdi?

Panjo kun iu kviete parolas kaj ŝia voĉo estas tiel mildsona, tiel plaĉplena por mi. Per dormemaj, duonmalfermitaj okuloj mi rigardas al panjo.

„Vi estas jam preskaŭ dormanta, fileto”, diras la patrino al mi. „Ĉu pli bone vi iros jam dormi?”

„Ne, patrino, mi ankoraŭ ne volas dormi!” respondas mi, sed nebula, dolĉa sonĝo ĉirkaŭprenas min kaj saniga infandormo fermas miajn palpebrojn. Tiel sonĝante mi sentas, ke iu milda mano karesas min kaj jam en la unua momento mi tuj rekonas ĝin, mi kaptas ĝin kaj forte premas la manon al miaj lipetoj..... En miaj oreloj denove sonoradas milda voĉo: „Nu, leviĝu fileto, jam tempo por dormi!”

Mi ne moviĝas, sed ankoraŭ pli forte kisadas la manon de l' patrino..... „Leviĝu anĝeleto!” — La duan manon la patrino metas ĉirkaŭ mia kolo kaj rapide movante la fingrojn ŝi tikletas min. Ĉio ĉi igas min leviĝi, ĉirkaŭbraki la kolon de la patrino kaj forte preminte mian kapon al ŝia brusto, diri: „Kara, bona patrino, kiom mi vin amas!”

Ŝi milde ekridetas, prenas mian kapeton en siaj manoj, kisas mian frunton, kaj metinte min sur siajn genuojn demandas min: „Do efektive vi tre amas min?”

Poste ŝi momente eksilentas kaj kviete daŭrigas: „Sed kiam ne plu estos via patrino, ĉu vi ankaŭ tiam ne forgesos ŝin?”

„Patrino kara, ne parolu pri tio!” ekkrietas mi, kisantante ŝin ĝis kiam el miaj okuloj komencas flui larmoj, la larmoj de amo kaj ĝojo.

Panjo helpas al mi senvestiĝi kaj surlitigas min. Mi envolas min en mia litotuketo kaj prenas kun mi iun porcelanan ludileton: hundeton, aŭ kateton kaj envolvinte ĝin apud mi en mola kuseneto mi ĝojas kiom bone estas por ili tie... Preĝinte al Dio, ke li gardu la paĉjon kaj patrinon, ke li donu la feliĉon al ĉiuj, ke morgaŭ estu bona vetero, — mi turnas min al la alia flanko. La pensoj iĝas miksitaj, malklaraj, kaj mi ekdormas feliĉa kaj paca.

(trad. M. P. — Siberio).

LEO TOLSTOJ.



## JUNULGASTEJOJ KAJ ESPERANTO.

Sur iu propaganda folio de la junulgastejoj mi vidis du bildojn. Unu prezentis kelkajn junulojn, sidantajn en ĉambro, ĉirkaŭ tablo, kaj absorbitajn per pasiiga kartludo. La alia montris scenon en junula tendo-vivo; unu disblovas fajron, alia alportas akvon. Sub tiuj ĉi bildoj estis demando: Kio estas pli bona? Kaj ŝajnas, ke neniu sane pensanta homo povus eĉ dum unu momento heziti pri la respondo.....

Estas multaj kialoj, pro kiuj la ideo pri la junulgastejoj estas tiel bona, tiel subteninda. Mi ne citos ĉiujn ..... vi ja konas ilin. Nur unu punkton mi volas akcenti. La junulgastejoj donas al la junuloj la okazon de renkontiĝo, interkonatiĝo, amikiĝo. Ili kreas amikecon, kaj tio ĉi estas altega merito, ĉar la amikecon ĉiu bezonas, kaj tiel malmulte da ĝi estas en la mondo.

Kiam la suno varmigas la teron, kiam venas la feliĉa momento, ke vi povas lasi malantaŭ vi la murojn de oficejoj, fabrikoj, lernejoj — de malproksime malfermas sin antaŭ vi la pordoj de la junulgastejoj. Ili invitas vin pasigi iom da tempo en la naturo, meze de kamaradoj — ĉu vi rifuzos la inviton? La gastejestrino jam atendas vin.

Sed kial vi limigas viajn paŝojn? La mondo ja estas vasta, kaj ne nur en via propra lando gasteme atendas la junulgastejoj. Se vi ne povas aĉeti triaklasan fervojbiletan, iru bicikle, iru eĉ piede — vi ja estas junaj! Transpasu la limon, vidu, kiel vivas viaj samaĝuloj en alia lando, iru premi iliajn manojn — vi ja kune devos iam konstrui novan mondon, vi, junaj.

Vi hezitas? Kial? Ho, jes, vi ankaŭ aŭdis pri la beleco de tiuj landoj trans la limo, sed vi sentas kvazaŭ glacian bloveton, kiam vi pensas, ke tie fremda lingvo sonos ĉirkaŭ vi, ke vi ne komprenos nek estos komprenata, ke atendas vin tie la sento de fremdeco. Vi vidos, kiel ĉirkaŭ vi aliaj amike babilas, sed vi ne partoprenos iliajn ĝojojn kaj amuzojn. Ĉiumomente vi suspektos ke estas pro vi, ke ili ridas, ke estas kontraŭ vi ke ili flustras, kaj anstataŭ amikeco, eble ĵaluzo, malfido, kaj malamo kreskos en viaj koroj. Kaj kun tiu rikolto vi neniam estos taŭgaj por konstrui pli feliĉan mondon.

Tiuj, kiujn la ekspresaj vagonaroj portas en la plej famajn eksterlandajn restadejojn, tiuj, kiujn atendas la grandaj hoteloj, havas al sia servo la tradukistojn de tiuj hoteloj, la tradukistojn de turismaj oficejoj — kaj eĉ malgraŭ tio multaj malagrable spertas



la ĝenon de la lingva diverseco. Vin neniu tradukistoj atendas. Vi mem devas rompi la murojn de la lingvaj diferencoj, aŭ resti malliberigitaj interne de ili, kiel birdoj en kaĝoj.

La hakilo jam kuŝas ĉe la muro, preta al ekbato. Tiu hakilo estas la internacia lingvo ESPERANTO, tiel simpla, tiel facila, tiel bela!

Kaptu tiun hakilon en viajn junajn, fortajn manojn! Batu per ĝi la murojn, kiuj apartigas vin de la mondo, por ke larĝiĝu via horizonto, por ke vi vidu la tutan grandan, majestan belecon de tiu ĉi mondo, por ke en ĉiu junulgastejo, en ĉiu lando, vi trovu ne fremdulojn, sed amikojn.


Junulgastejoj, via estonteco estas — ESPERANTO!

LIDJA ZAMENHOF.

### ENIGMOJ.

Skribu unu sub alian 6 seslitterajn vortojn, kiuj signifas:

1. Serpentosimilan fiŝon.
2. Arbon (rad.).
3. Skribaĵon.
4. Firme certigi.
5. Daŭre restas.
6. Telerara vazo.



a, a, a, a, a, c, d, e, e, e, e, e,  
ĝ, i, i, i, i, k, k, k, l, l, l, m, n,  
n, o, o, o, o, o, o, o, p, p, r, r, r, r,  
r, r, s, s, s, t, t, t, t, t, ŭ.

La vortoj signifas: en la meza vertikala vico — birdon; horizontale: — literon, prepozicion, trinkaĵon, konjunkcion, presaĵon, reĝon, oficiston.

Legu vertikale la duajn kaj kvinajn literojn de tiuj vortoj. Vi ricevos bonan konsilon.

Soissons, Franc.

J. BOURNICHE.

Riga, Latvolando.

B. REICHBERG.

Inter la ĝustaj solvintoj ni dislotos 3 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 1 Julio. Sendu la solvojn rekte al la redakcio.

Ĉi tiu numero estas la lasta de la dua jarkolekto. La tuta jarkolekto, bindita en bela kovrilo estas mendebla ĉe la redakcio. Prezo 0,80 guld., por abonantoj 0,65 guld.


Ankaŭ la unua jarkolekto estas ankoraŭ mendebla; prezò 0,75 guld., por abonantoj 0,60 guld.



## DAŪRIGA KURSO.

## Mia Kaprino.

Kiam mi loĝis en malgranda vilaĝeto, mi havis **kaprinon**. Ŝi estis granda, bela besto, kiu donis al ni multan bonan lakton. Tamen je mia bedaŭro mi devis vendi ŝin, ĉar mia edzino ne kuraĝis melki la beston, kaj mi ofte ne havis tempon.



Okazis ke en la proksima vilaĝo T. forbrulis la domo de la laboristo G. Ankaŭ lia kaprino mortbrulis. Kiam mi renkontis G'n, mi demandis: „Ĉu vi volas havi mian laktproduktanton?” La laboristo diris: „Jes, se ŝi ne estas tro multekosta.”

Ni interkonsentis pri la prezo kaj jam la sekvan tagon G.

venis al mi por forkonduki la kaprinon.

Post du, tri tagoj mi renkontis G'n. Kompreneble mi tuj demandis kiel fartas la besto. G. kapskuis — silentis momenton — kaj diris: „Ne bone — ne, tute ne bone. — La kaprino ne manĝas — ne trinkas — ne **blekas** — ne donas lakton. — Ŝi kuŝas la tutan tagon en la stalo, aŭ, kiam mi kondukas ŝin en la paŝtejon, ŝi rigardas **melankolie** ĉirkaŭ si kaj..... ekkuaŝas, kaj restas kuŝanta la tutan tagon. Se ni ne metus ŝin en la stalon, mi kredas, ke ŝi ankaŭ la tutan nokton senmove restus en la sama loko. Certe la besto mortos, se.....”

Kun granda miro mi aŭskultis kaj jam mi pensis, ke G. kredis min **trompanto**. Mi demandis: „Kiel estas eble?”

„Nu”, diris G., „ne malofte okazas, ke kaprino mortas pro hejmeo”.

„Pro hejmeo!!!” mi demandis. „Ĉu estas eble? Pro hejmeo-o????”

„Jes,” diris G.

„Nu bone,” mi respondis, „se estas nur hejmeo, mi reprenos la beston. Sed antaŭe mi venos al vi por vidi. Hodiaŭ posttagmeze mi estos ĉe vi, ĉu vi tiam estos hejme?”

„Ne, sed mia edzino atendas vin.”

Mi iris hejmen kaj rakontis al mia edzino kion mi aŭdis pri nia



fidela dombesto. Ni kune pripensis la aferon kaj mi **decidis** kunporti la ujon, el kiu la besto ĉiam manĝis kaj trinkis. Je la sesa mi estis en T. Kiam mi proksimiĝis al la domo de G., mi jam vidis sinjorinon G., kiu atendis min. Kiam mi estis ĉe ŝi, mi apenaŭ diris du vortojn, kiam la besto en la stalo aŭdis min, kaj blek-salutis. Sinjorino G. mire malfermis larĝe la okulojn kaj diris: „Aŭdu, aŭdu, la besto povas bleki! Estas la unuan fojon, ke mi aŭdas ŝin!” Mi montris al la virino mian kunportitan manĝujon kaj pecon da linsem-kuko kaj diris: „Nu, ni iru kune al la paciento”. Apenaŭ la besto vidis min, kiam ŝi streĉas la kolon kaj blekas kaj volas perforte liberigi sin por veni al mi. Sinjorino G. pretigas la manĝaĵon kaj trinkaĵon kaj intertempe mi karesas la beston. Kiam la virino alvenas kun la manĝaĵo, mi metas la ujon antaŭ ŝian buŝon kaj la besto ne manĝas kaj trinkas, sed manĝegas kaj trinkegas. Mire sinjorino G. rigardas kaj diras: „Iru vi nun for.” Mi faris tion, sed antaŭe mi metis mian surtuton sur la ŝultrojn de la virino. La besto tiam verŝajne ankoraŭ flaris la malnovan odoron, ŝi tute forgesis, ke mi estas for, kaj trinkis kaj manĝis plue. Ankoraŭ dufoje ni ludis la saman **komedieton** kaj tiel la kaprino resaniĝis.

Deventer (Ned.)

SES DE KOK.

**B.** Pli bone io ol nenio. — Gardi **kandelon** por la nokto. — For de l'okulo, for de l'koro. — Novaj sinjoroj, novaj **moroj**. — Per pacienco venas scienco. — Estu ĉapo laŭ la kapo.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A kaj B.
- II. Traduku A kaj B en vian gepatran lingvon.
- III. Lernu parkere la proverbojn en B.
- IV. Respondu al jenaj demandoj:


Kial oni devis vendi la kaprinojn? Kial G. bezonis kaprinojn? Ĉu G. tuj aĉetis la beston? Kiel fartis la besto en la nova loĝejo? Pro kio suferis la kaprino? Ĉu la antaŭa posedanto reaĉetis la beston? Kion li faris? Ĉu la kaprino rekonis sian antaŭan mastron? Kiel ŝi montris tion? Kiel oni poste manĝigis la beston?

**Faru verkaĵon laŭ unu el jenaj temoj:**

Miaj floroj. — Festo en la urbo (vilaĝo). — Estis nur sonĝo. — Tro malfrue. — Antikvaj kutimoj.

Sendu la verkaĵojn antaŭ 1 Julio al red. „La Juna Vivo”. Inter la sendintoj de la plej bonaj ni dislotos 3 premiojn.





### LA NAŬA LEClONO.

- |                |                   |                |
|----------------|-------------------|----------------|
| 1. lernejo     | 16. kol-haroj     | 31. gazeto     |
| 2. ĉapelo      | 17. flug-maŝino   | 32. inko       |
| 3. hoko        | 18. aŭtomobilo    | 33. kraĵono    |
| 4. surtuto     | 19. elektra-tramo | 34. plumo      |
| 5. butono      | 20. trajno        | 35. kajero     |
| 6. poŝo        | 21. radoj         | 36. violo      |
| 7. stelo       | 22. kreto         | 37. kakti      |
| 8. kalendaro   | 23. liniilo       | 38. korbo      |
| 9. la tero     | 24. instruisto    | 39. paperujo   |
| 10. hor-tabelo | 25. mano          | 40. ŝtrumpetoj |
| 11. tabulo     | 26. fingro        | 41. nazo       |
| 12. boato      | 27. okulo         | 42. Eŭropo     |
| 13. kamelo     | 28. okul-vitroj   | 43. Azio       |
| 14. kolo       | 29. buŝo          | 44. Aŭstralio  |
| 15. nuko       | 30. pantalono     | 45. Afriko.    |

La knabo lernas

La infano trinkas

La patrino lavas

— La knabo lernas Esperanton.

— La infano trinkas akvon.

— La patrino lavas veston.



## A. EN LA LERNEJO.

La instruisto: Bonan tagon, infanoj!

La infanoj: Bonan tagon, sinjoro!

Instr.: Ni **komencu!** Ni legu en la **geografia** libreto! **Paĝo** 25. La tero **konsistas el 5 partoj**. La nomoj de la mond-partoj estas: Eŭropo, Afriko, Azio, Aŭstralio kaj Ameriko (Ameriko ne estas sur la bildo). Inter la mond-partoj estas grandaj **maroj**. La nomo de granda maro estas **oceano**: La Granda **Oceano**, la Atlanta Oceano, la Hinda Oceano. — Ni **vojaĝu! Kien?** Kien?

Karlo: De Amsterdamo al Valencio en Hispanujo.

Instr.: **Kiel** ni iras tien?

K.: Ni iras per trajno al Parizo en Francujo, **preter** Bruselo en Belgujo. Post tio ni iras per aŭtomobilo kaj tramo **tra** la granda, belega, malnova urbego. La **muzeoj**, Eiffel-turo, domegoj, belegaj butikoj estas interesaj.

Instr.: Vi estas **inteligenta** knabo. Sed ne restu tro **longe** en Parizo. Nun Petro vojaĝu!

Petro: De Parizo per trajno al Marseille. Kaj poste per **vaporŝipo** al Valencio.

Instr.: Ĉu en la **antikva tempo oni** ankaŭ **povis** vojaĝi al malproksimaj landoj?

K.: Ne, ĉar tiam ne estis aŭtomobiloj, flugmaŝinoj, kaj trajnoj.

Instr.: **Kiel** la homoj tiam vojaĝis?

M. Ili nur vojaĝis per **primitivaj** boatoj, ĉevaloj kameloj kaj **azenoj**.

Instr.: Bone, Manjo! Vi estas en Valencio. Al **kiu** vi iras?

M. Mi estas esperantistino, kaj iras al mia amikino. Mi **korespondas** kun ŝi. Ni **ambaŭ** legas „La Juna Vivo.” „La Juna Vivo” estas gazeto por **ĉiuj** homoj, en la tuta mondo.

Instr.: „La Juna Vivo” do estas esperanta gazeto. Ĝi estas gazeto por Francoj, Germanoj, Belgoj, Danoj, ktp. (kaj tiel plu). **Kiu** faris Esperanton?

Inf.: **Doktoro** Zamenhof **kreis** Esperanton.

Instr.: **Rakontu** pri Zamenhof.

K.:La **historio** pri Zamenhof estas tre interesa. Li laboris **dum** la tuta vivo por internacia **lingvo**. Li diris: „Ĉiuj homoj estas miaj amikoj, kaj **tial** ni **devas kompreni unu la alian**. La tuta mondo unu granda familio! Jen la **idealo** de Zamenhof.



Instr.: Bone. Ĉu la mondo en la nuna tempo **nepre bezonas** Esperanton?

P.: Jes, sinjoro. Niaj **produktoj venas** el ĉiuj landoj: Petrolo kaj **greno** el Ameriko, teo el **Hindujo**, ligno el **Skandinavio**, kafeo el **Sud-Ameriko**, lano el Aŭstralio, **lak-aĵo** el Japanujo — ktp. Multegaj homoj el multaj landoj laboras por ni. Tial ni devas kompreni unu la alian.

Instr.: Bone, bone! Ĉu estas multaj **komunikiloj** inter la homoj?

K.: Poŝto, telegrafo, telefono, radio, trajno, flugmaŝino, vaporiŝipo, motor-ŝipo, aŭtomobilo.

Instr.: Ĉu mankas **grava ligilo** inter la homoj?

P.: Jes, sinjoro, la **ĉefa komunikilo**, la internacia lingvo mankas. La homoj ne povas kompreni unu la alian. Estas **pli ol mil** diversaj lingvoj en la mondo.

Instr.: Vi estas stulta knabo. Estas ja nia **komuna** lingvo „Esperanto”. Sed nur malmultaj homoj **uzas** Esperanton. Vi estas junaj kaj **fortaj**. Rakontu al ĉiu pri la **utilo** de Esperanto.

Inf.: Volonte! Volonte!

Instr.: La verda stelo jam **brilas** en nia lernejo. La **celo** de ĉiuj esperantistoj estas: „**La verda stelo en ĉiuj lernejoj!**”

Estas jam la tria horo, nun estas la esperanto-leciono.

B. Mi povas vojaĝi — la homoj povas vojaĝi.  
 La knabo devas kompreni — la knaboj devas kompreni.  
 La knabo devis kompreni — la knaboj devis kompreni.  
 La knabo povis vojaĝi — la knaboj povis vojaĝi.

C. Legi — legejo, lerni — lernejo, kuiri — kuirejo, hundo — hundejo, greno — grenejo, dormi — dormejo, kongreso — krongresejo, loĝi — loĝejo.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C.

II. Kopiu. A, B, C en vian kajeron.

III. Traduku A, B, C en vian gepatran lingvon.

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. En jenaj gazetoj aperis artikoloj el „La Juna Vivo”: Folkebladet” (dana gazeto): „Kiu scias” (L.J.V. No. 9—32). „Lingvo Libro”: „Tri knabinetoj” (L.J.V. No. 6—29).

2. Esperantistaj grupoj en jenaj lokoj enkondukis „L.J.V.”: Belgujo: Brusel, Mechelen. — Ĉeĥoslovakujo: Košice. — Francujo: Le Havre. — Nederlando: Buitenpost, Enkhuizen, Gemert. Usono: Brooklyn.

3. En Rotterdam, Alkmaar kaj West-Graftdyk oni prezentis „La Novaj Vestoj de la Reĝ(in)o.” („La Juna Vivo” No. 6—’35). La sukceso estis grandega.



## LA DEKA LECIONO.

<b>tagoj:</b>	Majo	30 =	tridek
dimanĉo	Junio	34 =	tridek kvar
lundo	Julio	40 =	kvardek
mardo	Aŭgusto	50 =	kvindek
merkredo	Septembro	60 =	sesdek
ĵaŭdo	Oktobro	70 =	sepdek
vendredo	Novembro	80 =	okdek
sabato	Decembro	90 =	naŭdek
<b>monatoj:</b>	11 =	dek unu	100 = cent
Januaro	13 =	dek tri	1000 = mil
Februaro	19 =	dek naŭ	0 = nulo.
Marto	20 =	dudek	
Aprilo	25 =	dudek kvin	

## EN LA LERNEJO.

Instr.: Nun la esperanto-leciono. **Atentu!** Atentu! **Aŭskultu** al mi!

Manĝo, ĉu vi **scias** la nomojn de la tagoj en Esperanto?

M.: Dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato.

Instr.: Bone! Karlo, la nomoj de la monatoj estas:

K.: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro.

Instr.: Nun ni **nombru** de unu **ĝis** cent.

Klaso kaj instr.: Unu, du tri.....ĝis cent.

Instr.: Nun mi montras la objektojn, kaj vi diru la **vortojn** en Esperanto. (La instr. montras per bastono nazon, buŝon, orelojn, ĉapelon, surtuton, kaktojn..... La klaso respondas).

Instr.: Kiu estas sur la bildo? — **D.ro Zamenhof** estas sur la bildo.

Kiuj estas en la klaso? — **La infanoj** estas en la klaso.

Respondu **hejme** al **jenaj demandoj**: Kiuj sidas en la benkoj?

Kiu staras antaŭ la klaso? Kio kreis Esperanton? Kiu vojaĝis

al Valencio? Kiu sidas apud vi? Kiu montras la objektojn?

Ĉu Esperanto estas utila al la homoj? Ĉu la homoj nepre

bezonas Esperanton? Kio estas Esperanto? Kie vi lernas Es-

peranton? Ĉu vi ŝatas Esperanton? Ĉu vi **skribas** per plumo?

Ĉu vi skribas novajn vortojn? Ĉu miaj demandoj estas

**facilaj**? Kia estas la koloro de la tabulo? Ĉu la koloro de

la papero estas **ruĝa**? Kie pendas la hor-tabelo? Ĉu vi scias,

kio estas sur la tablo? Kia estas la koloro de la kaktoj? Ĉu



Esperanto estas facila lingvo? Kio staras sur la tabulo?

Instr.: Estas **jam 35 minutoj** post la tria (horo). Nun ni ludu. (Ili ludas la ludojn en No. 10-11 kaj No. 12 '36 por **ekzerci** la vortojn).

Instr.: Estas 10 minutoj antaŭ la kvara (horo). Ni **kantu!** Manĝo serĉu en „La Juna Vivo” **belan kanton!** (La infanoj kantas **simplajn** kantojn).

- I. Lernu bone la novajn vortojn.
- II. Kopiu la lecionon en vian kajeron.
- III. Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.

---

## LUDO.

En la antaŭa No. de „L.J.V.” estis ludo „Prezenti verbojn”. Sed oni povas bonege prezenti ankaŭ aliajn vortspecojn, ekz. adjektivojn. Por prezenti ekz. la vorton **laŭta**, oni metu la manplatojn sur la orelojn; **mallaŭta** oni povas klarigi, farante kelkajn paŝojn sur la piedfingroj. La vorton **dika** oni povas prezenti, farante brakmovojn malproksime antaŭ la ventro, **maldika**, montrante la malgrandan fingron, ktp.

Laŭ ĉi tiu maniero la lernantoj plej facile lernos la vortojn, kaj ankaŭ memoros ilin, ĉar ili samtempe vidas la sencon.

---

## KORESPONDADRESOJ.

**Al niaj abonantoj:** Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj (por ĉiu plia linio oni aldonu 0,30 gld.).

**Danujo:** Geesperantistoj! Ĉu vi travojaĝos Sudan-Jutlandon? Tiam bonvolu viziti la klubon „Ĉenero”, kiu certe aranĝos kunvenon. Oni sendu karton al: S.ro Heinrich Michels, Skodborg J., Danlando.

**Germanujo:** Ni dez. kor. kun s-anoj en ĉ.l., ne kun USSR. R. Schippers, Krefeld, Ispelstr. 23; K. Cellers, Krefeld, Alte Sinnerstr. 17.

**Germanujo:** 33 jara S-ano dez. kor. kun ges-anoj de ĉie. Resp. certa! (Fotojn). Paul Kiessling, Obersteinbach über Döbeln.

**Nederlando:** Serĉas ĉiajn korespondantojn, ĉ.l., por geinstruistoj, knaboj kaj aliaj: S.ro Chr. Schyf, Grebberstr. 2B, Haarlem, resp. certa.

**Ĉiu, kiu varbas 5 abonantojn, sciigu al ni, ĉu li (ŝi) deziras donace ricevi la unuan aŭ duan bind. jarkolekton.**



**Germanujo:** A. Biermann, Wuppertal-B., Raüental 68, dez. interŝ. p. m. Mi akceptas ĉiun kvanton, kaj resendas la saman kvanton da aliaj.

**Nederlando:** 22-jara fino dez. kor. 1e kun infanoj eksterl.; ne pli aĝaj ol 14-jaraj; 2e kun negroj, esperantistaj; 3e kun gesamideanoj eksterl., prefere geedukistoj. Adr.: F.ino v. Dyk, Rauwerd (Fr.).

**Nederlando:** Mi dez. desegnaĵojn por Esp. rubriko en skoltgaz. Form.: 9 x 12 cm. Onklo Johano, Schotersingel 61, Haarlem.

**Nederlando:** 21-jara S.ino dez. kor. per leteroj, kun ĉiuj landoj. Adr.: D. Veerman-de Winkel, Oostwoud.

**Nederlando:** S. Wielstra, Eillarstr. 28, Leeuwarden, dez. kor. per let., poŝtk. il., kaj poŝtm., kun ĉiuj landoj

**Nederlando:** Du progresintoj dez. kor. per P. I. kaj leteroj. Ni certe resp. K. do J. Meester, Stompetoren (N. H.).

**Portugalujo:** Esp. isto 22-jara dez. kor. per il. poŝtk. kaj poŝtm. kun fraŭlinoj. Manuel Martins Colaco, Alentejo, Aljustrel.

**Svedujo:** 17 jara knabo dez. kor. kun araboj, negroj, finnoj, grekoj, poloj. Resp. certa. Kn. Asplund, Viktoria, Surte.

**Nederlando:** La Esperantogrupa el 't Zand serĉas gekorespondantojn en ĉiuj landoj. Certa resp.: S.ro C. Lenghaus, 't Zand (N.H.).

**Japanujo:** Bonvolu sendi al ni interesajn artikolojn, ekz. pri lerneja vivo, ĉiutaga vivo, moroj kaj kutimoj de knabinoj, por la gazeto. Kaj sciigu vian adreson al la sekretariino, se vi estas malpli ol 30 jara junulino, kaj volas korespondi kun japanaj knabinoj kaj junulinoj. Adr.: F.ino Ykiko Isobe, Sekretariino de Kokusai-Sizyo-Sinzen-Kyokai, 7—5, Ginza-Nisi, Kyobasi, Tokyo, Japanujo.

**Japanujo:** En la Sesa Knabina Liceo en Tokyo oni enkondukis Esperanton por la unua-jaraj lernantinoj. Sendu multajn leterojn, kartojn, librojn ktp. al la gvidanto: S.ro Ishiguro, Huritu Dai-6 Kôto-Zyogakkô, Siba, Tokyo, Japanujo.

**Jugoslavio:** Nia amiketo M. P. Filipovic (Korman-Kragujevac) skribis al ni, ke li ricevis dum la pasko pli ol 100 leterojn, kaj ne eblas al li respondi al ĉiuj. Ĉar multaj informiĝis pri lia naskiĝtago li petas publikigi, ke li festas ĝin *la 28an de Junio*.

**Hispanujo:** K.do Felix Navarro, Instr., Tierzo (Guadalajeva), dez. kor. (ankaŭ liaj gelernantoj) poŝtk. il., leteroj k.c.

**Hispanujo:** 21 jara fraŭlo dez. kor. kun ĉ.l., pri ĉ.t., interŝ. ĵurnalojn, gazetojn, ktp. Artemio Espanyol, Str. Major 40, Alcover (tar.).

**Nederlando:** 16-jara knabo dez. kor. kun ĉiuj landoj. Adr.: F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam

### ATENTU!!!

**Usono:** Amerika Esp. Inst., 1111 Brook Road, Rockford, Illinois.

En **Ĉeĥoslovakujo** oni ankaŭ povas pagi ĉe: Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko, Praha, XIX — Uralská, nám. 447. Poŝtĉekkonto 12.371.

**Pro manko de spaco ni ellasis: La solvojn de la enigmoj, korespondadon, anoncojn kaj aliajn sciigojn.**